



AKTUALAJ TUTMONDAJ EKZISTENCIALISMAJ RISKOJ EN KUNTEKSTO DE LA KONFERENCO GER 2020

Stano MARČEK



ANTAŬPAROLO

Tutmondiĝo estas kompleksa procedo, kiu intervenas en ĉiujn kampojn de la socia vivo, ofte kun la tendenco de formado de uniforma tutmonda kulturo en larĝa senco de la vorto.

Tutmondaj problemoj estas nuntempa diskutata temo. Signifoplenaj tutmondaj problemoj ofte rilatas kun ŝanĝoj en la vivmedio. Al tiuj ĉi demandoj oni aljuĝas grandan gravecon, ĉiam pli emfaze ili influas al orientiĝo de la tradicia politiko, kaŭzas premon al soci-ekonomiaj aktivecoj kaj disdividado de la nacia enspezo inter la sociala kaj mediprotekta sferoj, dum ili fariĝas subjekto de la atento de la civitana publiko.

La nuntempan homaron suferigas precipe la reciproke ligitaj problemoj. La daŭre konservebla disvolviĝo de la homa socio postulas agordi la soci-ekonomiajn aktivecojn ne nur kun la medio, en kiu ĝi rekte plenumas siajn aktivajojn, sed estas necese konsideri ankaŭ rilatojn en larĝaj teritoriaj interrilatoj, ofte eĉ la tutmondan vidpunkton. Al la nuntempaj tutmondaj problemoj necesas rigardi precipe en kunteksto de scienc-esploraj, teknike-teĥnologiaj, natursciencaj kaj vivmedi-defendaj, socie-ekonomiaj, politikaj, sanitaraj kaj demografiaj, etikaj, moralaj kaj kulturaj aktivajoj kaj trendoj.

Tutmondaj ekzistencialismaj riskoj ĉiam pli eniras la homan vivon kaj minacas la homan ekziston ĝis senprecedenca nivelo. Pro tio ekzamenado de ekzistencialismaj riskoj fariĝis la kialo de apero de pluraj laborlokoj kaj projektoj. Kiel ekzemplo povas esti *Future of Humanity Institute* – Instituto de la homa estonteco ĉe *University of Oxford* – Universitato de Oksfordo, kiu estis establita en 2005, kaj ĝia direktoro estas la filozofo kaj eminenta reprezentanto de transhumanismo Nick Bostrom, aŭ *Cambridge Project for Existential Risks* – Kembriĝa Projekto pri Ekzistencialismaj Riskoj, kiu fariĝis bazo por la starigo de *Centre for the Study of Existential Risks* – Centro por Studado de Ekzistencialismaj Riskoj, kies ekesto estis anoncita en la jaro 2012.

En Slovakio la unuajn agadojn, ligitajn al la studo de tutmondaj ekzistencialismaj riskoj, aŭspiciis Slovacia Vivmedia Socio, kiu en la jaroj 2011 ĝis 2019 organizis naŭ konferencojn "Tutmondaj Ekzistencialismaj Riskoj" (*Global Existential Risks*), kies kerno estis problemaro de transhumanismo kaj transhumanaj teknologioj kaj kun ili ligitaj tutmondaj ekzistencialismaj riskoj.

La problemaro de esplorado de mondaj ekzistencialismaj riskoj estas ligita kun disvolviĝo de transhumanismo, kaj estas esplorita kaj ellaborita de gvidaj teoriistoj pri transhumanismo Nick Bostrom, James Hughes, Milan Ĉirkoviĉ, Ray Kurzweil, Eliezer Yudkowsky, Robin Hanson, Vaclav Reesace, Martin Reesace kaj multaj aliaj.

La disvolviĝo de transhumanismo estas ligita kun antaŭviditaj kaj iom nedetermineblaj riskoj, kiuj estas ligitaj ekz. kun nanoteknologioj, tiel nomata Scenaro de Griza Ŝlimo – *Grey Goo Scenario*, kiu kalkulas pri perdo de la homa kontrolo super nanobotoj, manipulantaj atomojn, resp. molekulojn, aŭ kun malkovro de superhoma inteligenteco.

La riskojn de transhumanismo detale ellaboritis Nick Bostrom, kiu analizis eblajn scenarojn de



la homa formorto, rezulte de elglito de transhumanisma teknologio de sub la homa kontrolo.

Al la ĉefaj riskoj, ligitaj al transhumanismo, apartenas biologia milito, nanomilito, nuklea milito, kosma milito, artefarita inteligenteco, superinteligenteco, singularaĵo, nanoteknologia poluado, “Grey Goo”-efekto, gena manipulado aŭ aliaj.

Tutmondaj ekzistencialismaj riskoj estas tamen ligitaj kun aliaj minacoj, ol nur kun tiuj, kiuj estas ligitaj kun transhumanaj teknologioj. Minaco por la homa ekzisto povas esti ankaŭ malnoviĝintaj ekonomiaj aŭ politikaj sistemoj, aŭ malvenkita ekonomia aŭ politika krizoj. Laŭ Nick Bostrom tutmondaj ekzistencialismaj riskoj estas tiuj, kiuj prezentas seriozan danĝeron en la tutmonda skalo. Kiel ekzemploj povas esti tutmondaj postsekvoj de naturaj katastrofoj, kiaj estas ekzemple vulkanaj erupcioj aŭ tertremoj, pandemio, eĉ nukleaj akcidentoj en la tuta mondo, plie tiranio, neregeblaj sciencaj eksperimentoj, klimataj ŝanĝoj, minacoj el la kosmo aŭ ekonomia kolapso.

La konstanta kaj progresanta tutmonda krizo kaj la kresko de tutmondaj translandaj minacoj kreas negativan sinergian efikon, kiu povas rezultigi negativan scenaron de forpaso de la homa civilizo aŭ formorto de la homo kiel la vivspecio.

Tutmondaj problemoj estas nuntempe diskutata temo. Gravaj tutmondaj problemoj ofte interrilatas kun vivmediaj ŝanĝoj. Al tiuj ĉi demandoj oni aljuĝas grandan gravecon, ili ĉiam pli emfaze influas al orientiĝo de la tradicia politiko, kaŭzas premon al la soci-ekonomiaj aktivecoj kaj disdividado de la nacia enspezo inter la socialan kaj vivmedi-defendan sferojn, dum ili fariĝas subjekto de la atento de la civitana publiko.

La nuntempa homaron suferigas precipe la kompleksaj kaj reciproke ligitaj problemoj. En la atmosfero de la degeneranta tutmondiĝo kaj kreskanta diverĝenco la solvoj serĉatas multe pli komplike. En tiu ĉi kunteksto aperas ankaŭ publikigo de la ĉiujara raporto pri tutmondaj riskoj de Tutmonda Ekonomia Forumo (World Economic Forum - WEC).

Kiel unu el la ĉefaj trendoj de la nuntempa kaj estonta evoluoj oni signas malaltiĝantan gravecon de la ekonomiaj riskoj. Oni atentigas pri tio, ke la homoj sur la tuta mondo havas post la sukcesa venko de la plej malbona financa krizo de la dua mondmilito la plej altan vivnivelon en la historio. Problemo estas, ke la hodiaŭa mondo ne estas kapabla solvi kompleksajn defiojn, reagi al subitaj ŝanĝoj kaj iom-pos-tiom alpakiĝantaj pliaj riskoj. La kialo verŝajne estas manko de kunlaboro, kiu gvidus al veraj sistemaj ŝanĝoj, bezonataj por solvi tiun „novan normalon“. Kreskantaj diferencoj en enspezoj kaj riĉeco restas signifa moviga forto de la tutmondaj riskoj ankaŭ en la plej proksima periodo.

Dum antaŭ jardeko, en la tempo de la ekonomia krizo, estis kiel la plej grandaj riskoj konsiderataj la malaltiĝantaj prezoj de aktivoj, la malrapidiĝanta ĉina ekonomio, aŭ ĥronikaj malsanoj, do riskoj de la ekonomia kaj sociala karakteroj, nuntempe la karaktero de riskoj transiras al mediprotektaj kaj teknologiaj kampoj.

Post la tempoj de tutmondiĝo la mondo trasaltis al periodo de diverĝenco. Geopolitikan kaj geo-ekonomian streĉon samtempe WEC konsideras „la plej urĝa tutmonda risko de la nuntempo“. Pro kialo de tiu ĉi realaĵo estos verŝajne multe pli malfacile trovi agordon ĉe solvado de tutmondaj problemoj de la homaro, de defendado de la vivmedio, tra nekontrolata migrado, ĝis reakcioj je etikaj defioj de la kvara industria revolucio.

Internacia Mona Fondaĵo (International Monetary Fund - IMF) antaŭvidas en la proksimaj jaroj iom-post-ioman malrapidiĝon de la ekonomia kresko. Maltrankviliga estas precipe la fakto, ke la nivelo de la tutmonda enŝuldiĝo nuntempe moviĝas en la alteco de 225 procentoj de MEP (malneta enlanda produkto), kio estas esence pli multe, ol antaŭ la lasta ekonomia krizo.

Demandoj de nekontrolita amasa migrado dominis resumon de riskoj en la pasintaj jaroj. Altan oni konsideras la riskon de migrado, kaŭzitan de krizo aŭ pro ekonomiaj faktoroj. Kiel potencialajn estontajn riskojn, kiuj la sacion povus baldaŭ surprizi multe pli intense, ol nuntempe ŝajnas, WEC signis la temojn kiel kvanta kriptografio, mona populismo, afektivaj kalkuloj kaj degradado de la homaj rajtoj.

Esploro pri tutmondaj ekzistencialismaj riskoj sendube fariĝis la neceso ankaŭ en Slovakio, ĉar la translimaj tutmondaj efikoj de ekzistencialismaj riskoj ĉiam pli influas la ĉiutagan vivon de civitanoj de Slovakio.



La celo de la konferenco "Tutmondaj ekzistencialismaj riskoj 2020" estis provizi taŭgan platformon por informi la profesion kaj sciencan publikojn, interŝanĝi spertojn kaj prezenti novajn rezultojn pri la objekta problemaro.

ADRESO DE LA AŬTORO

Stano MARČEK

Zvolenská 15/21, 036 01 Martin, Slovakio, Redaktoro de la revuoj *Juna Amiko* kaj *Esperanto aktuell*,
Membro de Akademio de Esperanto
e-mail: Stano.marcek@gmail.com